

tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Ĉasopis Hrvatskog saveza za esperanto

aprilo 2002



- ★ 95-jara Esperanto-societo en Rijeka
- ★ 5-a kongreso de kroataj esperantistoj en Rijeka
- ★ Alp-Adria Konferenco en Rijeka - Kostrena
- ★ Mezeŭropa konsultiĝo en Rijeka - Kostrena
- ★ Konkurso de elementaj lernejoj pri Esperanto
- ★ Projekto “Mezeŭropo estas mia hejmo”

Karaj legantoj,

La Esperanto-Societo en Rijeka atingis belan jubileon: 95 jarojn de post sia fondiĝo. En la lasta tago de majo 2002 tie renkontiĝos partoprenantoj de la 14a Alp-Adria Konferenco samkiel la partoprenantoj de Mezeŭropa Konsultiĝo. Sian alvenon konfirmis reprezentantoj de Aŭstrio, Ĉeĥio, Hungario kaj Pollando. La kunvenon partoprenos ankaŭ Michela Lipari, respondeca por Landa Agado nome de la estraro de UEA. Lige al tiuj du aranĝoj sabaton la 1an de junio 2002 okazos la 5a kongreso de kroataj esperantistoj. En ties kultura programo ni povos ĝui koncerton de Georgo Handzlik el Pollando kaj Neven Mrzlečki el Zagrebo sed ankaŭ la novan teatraĵon de Studenta Esperanto-Klubo. La kongresa ekskurso dimanĉon gvidos al Gorski Kotar, al Lokve, Groto Lokvarka kaj al Fužine.

La Esperanto-Domo en Kostrena, kiu de post la jaro 1997 pro Leĝo pri asocioj ne apartenis al Esperanto-Societo en Rijeka, ekde la jaro 2002 per la nova Leĝo pri asocioj deneve apartenis al ĝi. La domo troviĝas en Kostrena, komunumo apud Rijeka. Tial Kostrena laŭ la iniciato de Emil Hrvatini, gastigos la kroatan konkurson pri scio de Esperanto. Oni atendas tridekon da konkursantaj lernantoj el pluraj



elementaj lernejoj el Zagreb, Slavonski Brod, Varaždin, Matulji kaj Sv. Filip i Jakov.

Al la nova leĝo pri asocioj dankas sian posedaĵon ankaŭ Esperanto-Societo *Bude Borjan*, ĉar ĝi reposedis garaĝon, kiun antaŭ dek jaroj laŭ la iniciato de Zlatko Tišljar aĉetis pluraj membroj de *Bude Borjan*. Intertempe pluraj membroj forpasis: Emilija Lapenna, Dragutin Balagović, Stelio Tissiotti, Lela Rotkvić, dum la posedaĵo restas. Esperanto-Societo *Bude Borjan* ludonas la garaĝon.



Tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en militaj jaroj 1993 kaj 1994.
Aperas laŭeble kvarfoje jare - Jaro XXI, numero 1/2002
ISSN 0352-1583

Redakcio: Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio

tel: (385 1) 46 17 550, **fakso:** (385 1) 46 19 373

rete: esperanto@zg.tel.hr

http: <http://pubwww.srce.hr/esperanto/kel>

Tiu ĉi numero estas eldonita per helpo de Kroata Ministerio pri kulturo.

Kontribuis: Lucija Borčić, Višnja Branković, Marica Brletić, Davor Klobučar, Jesper Neergaard, Vjekoslav Morankić, Josip Pleadin, Dinka Šimunić, Spomenka Štimec

Tajpis: Spomenka Štimec

Redaktoro: Spomenka Štimec

Grafike aranĝis: Josip Pleadin


Presis: Grafokom, Durdevac

Anonctarifo 1/1 paĝo 1000 kn (135 EUR), 1/2 paĝo 500 kn (68 EUR).

Abono: 4 numeroj jare 40 kn (9,5 EUR)

unuopa numero 10 kn (1,5 EUR)

La redakcio ne respondecas pri opinioj en la subskribitaj tekstoj.



KIO OKAZOS EN RIJEKA?

Rijeka gastigos de la 31a de majo ĝis la 2a de junio 2002
kelkajn aranĝojn



14a Alp-Adria Konferenco Mezeŭropa konsultiĝo

**5a kongreso de kroataj esperantistoj (la 1an de junio 2002, malfermo je la 11 h)
Konkurso pri Esperanto por lernantoj de elementaj lernejoj
Projekto por mezlernejoj "Mezeŭropo estas mia hejmo"**

Ĉiuj eventoj daŭras tri tagojn, krom la 5a kongreso de kroataj esperantistoj, kiu okazas nur sabate inter 10h00 kaj 18h00 en la Pupteatro de Rijeka, Gradsko kazalište Rijeka, Blaža Polića 6.

Alp-Adria Konferenco kaj **Mezeŭropa Konsultiĝo** okazos en Hotelo "Lucija" en Kostrena, kie loĝos partoprenantoj kiuj mendis hotelon.

En Esperanto-Domo en Kostrena loĝos partoprenantoj de **Konkurso pri Esperanto por lernantoj de elementaj lernejoj** kaj **"Mezeŭropo estas mia hejmo"**.

Partoprenantoj kiuj mendis malpli kostan loĝejon loĝos en Rijeka, en Dom Crvenog križa Rijeka, Janka Polića Kamova 32.

Respondeculoj de la aranĝoj:

- Alp-Adria Konferenco: Vjekoslav Morankić
- Mezeŭropa konsultiĝo: Ankica Jagncić
- 5a kongreso de kroataj esperantistoj: Spomenka Štimec
- Infana konkurso: Emil Hrvatinić
- Projekto "Mezeŭropo estas mia hejmo": Judita Rey Hudeček

EL LA HISTORIO DE ESPERANTO EN RIJEKA (okaze de la 95-jariĝo de fondo de la unua Esperanto-societo)

Pri la historio de Esperanto en Rijeka artikolis plurloke kelkaj aŭtoroj, sed la plej grandan esploron certe faris rijeka samideano (antaŭ nelonge forpasinta) Radoslav Škalamera. Kiel sperta ĵurnalistino li esploris detale la tekstojn kiuj aperadis en "Riečki Novi List", en diversaj jaroj.

En la numero de la 3-a de oktobro 1907 la gazeto aperigis la jenan artikolon:

"Konstituiĝo de esperantista grupo - la esperantista fondkunveno de la pasinta sabato (t.e. sabato la 28-an de septembro 1907 - rim. de R. Škalamera) estis amase vizitita. Baruno L. Orczi malfermis la kunvenon per Esperanta parolado, kio elvokis bonegan impreson. Fondiĝis "Adriatika Ligo esperantista", al kiu estos tasko disvastigi la internacian lingvon Esperanto en la lando ĉirkaŭ la Adria maro. La unua sukceso de la Ligo estas, ke ĝi faris en Rijeka sekcion kun la nomo "Fiumana Esperantista Grupo", kiu havos por sia laborkampo Rijeka kaj ĉirkaŭaĵon. En la

estraron por "Adriatika Ligo Esperantista" estis elektitaj: barono L. Orczi, kiel prezidanto; inĝeniero E. Mihić, kiel sekretario; Rikard Rack, kasisto, dum la estraro de "Fiumana Esperantista Grupo" konsistas el sinjoroj E. Springheft kiel prezidanto, R. Gilić kiel sekretario, A. Schuetz kiel kasisto kaj A. Schlemmer kiel bibliotekisto. Monata kotizo estos 80 fileroj, dum ĉe la membriĝo necesas pagi sumon de 2 kronoj. Kiu deziras membriĝi, tiu povas kontakti per simpla poŝtkarto s-ron Rudolf Gilić, Via della Riva, n-ro 2, aŭ membrojn de la estraro kiuj portas la internacian esperantistan signon (verdan kvinpintan stelon)".

Kvankam la societoj priskribitaj en la supra teksto ne daŭris longe (verŝajne nur ĝis 1909), Rijeka ekde tiam preskaŭ konstante aperas kiel konata Esperanto-centro kaj ĝi donis al la Esperanto-movado konsiderinde gravan kontribuon.

J.P.

PROGRAMO EN RIJEKA

Vendredon, la 31-an de majo 2002

Kiam?	Kio?	Kie?
Tuttago	ALVENO Partoprenantoj de: Alp-Adria Konferenco kaj Mezeŭropa Konsultiĝo	Akceptejo: Hotelo "Lucija" Kostrena Loĝejo: 1. Hotelo "Lucija" Kostrena 2. Hotelo "Neboder" Rijeka 3. Dom Crvenog Križa Rijeka
20h10	Infanoj - trajne	Esperanto-Domo Kostrena
20h10	Kongresanoj kiuj alvenas trajne kaj loĝas en Rijeka	Dom Crvenog križa Rijeka
16h00-18h30	Kunsido de Alp-Adria Komitato (gvidas: Morankić) Kunsido de Mezeŭropa Konsultiĝo (gvidas: Jagnjić) Kunsido de projekto Mezeŭropo estas mia hejmo	Hotelo "Lucija" Kostrena
19h30	Vespermanĝo por mezeŭropaj gastoj kaj por mendintoj	Hotelo "Lucija" Kostrena
20h00	Prezento de Esperanto-Domo - Koktelo	Esperanto-Domo Kostrena
21h00	Kunestado por plenkreskuloj Prezento de mezeŭropa projekto pri lernejoj Porinfana interkona vespero	Hotelo "Lucija" Kostrena Esperanto-Domo Kostrena

Sabaton, la 1-an de junio 2002

Kiam?	Kio?	Kie?
9h00 - 11h00	Akceptejo	Pupteatro Rijeka
8h00 - 10h00	Kunsido de Alp-Adria Komitato Kunsido de Mezeŭropa Konsultiĝo	Hotelo "Lucija" Kostrena Hotelo "Lucija" Kostrena
9h00 - 10h30	Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb ekzercas	Pupteatro Rijeka
11h00	MALFERMO: Himnoj de koruso el Opatija Salutvortoj Salutoj de la gastantaj landoj Kroataj esperantistoj kaj interregiona kunlaboro (prezentas: Radenko Milošević) Koruso	Pupteatro Rijeka

Kiam?	Kio?	Kie?
12h30	Prezidantaro respondas al la membroj	Pup teatro Rijeka
13h00	Tagmanĝa paŭzo Ekzercas Georgo Handzlik	Pup teatro Rijeka
14h30	Teatraĵo de Studenta Esperanto-Klubo Zagreb: Instrukcioj por simpla vivo harmonie kun la naturo	Pup teatro Rijeka
15h30 - 16h30	Posttagmeza koncerto de Georgo Handzlik	Pup teatro Rijeka
16h45 - 17h45	Koncerto de Neven Mrzlečki Fermo de la kongreso Urbotrarigardo por interesitoj	Pup teatro Rijeka

Dimanĉon, la 2-an de junio 2002

Kiam?	Kio?	Kie?
8h00	Meso	Preĝejo Sankta Lucija Kostrena
9h45	Kunsido de Alp-Adria komitato Kunsido de Mezeŭropa Konsultiĝo	Hotelo "Lucija" Kostrena
10h00	Aŭtobusa ekskurso * al Lokve, Fužine, lago, Groto ...	
	Tagmanĝo	Fužine
16h15	Reveno al Rijeka	

* Prezo de la ekskurso kun tagmanĝo: 110,00 kn / 15 €




Noto:

Esperanto-Domo estas konata
kiel Vilao "Amfora"

Hotelo "Lucija":
telefono 051/289-004, 289-006

Esperanto-Domo:
telefono: 051/289-478



ELLA MEDVEDOVA – ZAGREBA NOVEDZINO

Ella Medvedova, kuracistino el Rusio ekloĝis en Zagrebo. Dum la zagreba UK ŝi renkontis amikon Rajko Pavuša al kiu ŝi planas edziniĝi en julio 2002. Ĉar la renkontiĝo okazis dum la kongresa programo **Danco sur la placo**, en kiu renkontiĝis esperantistoj kun zagrebanoj, kaj kiun financis Urba oficejo pri kulturo, KEL petis urbestrejon proponi la edziĝatestanton. Ĉu la urbestreja oficisto edziĝatestos, ankoraŭ ne estas klare.... Rajko bedaŭrinde ne parolas Esperanton.



KVAR TELEVIDAJ ELSENDOJ

La kroata televido filmis pri niaj aktivecoj kvar televidajn elsendojn dum januaro kaj februaro. Darko Blažić, la 14-jara membro de Esperanto-Societo *Bude Borjan* gvidis kurson pri poŝtelefonoj, kio altiris atenton de TV. Plaĉis al la redaktoro ke junulo instruas homojn de la tria aĝo, kadre de nia projekto de intergeneracia kunlaboro.

Du televidajn elsendojn ni akiris per prezento de japana somerkimono nomata *yukata* kiun vestis kaj modelportis blinda zagreba sinjorino Diana Zerec-Virkes, kunlaboranto de la klubo. Pri ŝia kimono, pri kiu ŝi lernis dum la UK, kadre de programero de Kikuŝima Kazuko, aperis ankaŭ artikolo en *Veĉernji list*. En la programo pri yukata helpis gesinjoroj Kameda el la japana ambasadejo en Zagrebo.

Ella Medvedova kun sia zagreba amiko gastis en TV-elsendo kadre de Valentin-tago.

NE FINIĜIS LA ZAGREBA UK

Por Kostadinka-Dinka Ŝimunić, la kasisto de la kongreso ankoraŭ ne finiĝis la 86a UK. La kasfolioj estas daŭre traktataj inter Zagrebo kaj la Centra Oficejo. La kasista laboro nepre estas la plej longdaŭra.

Dinka trovas tempon kanti en la virina koruso **Ezerki**, por kiu ŝi esperantigis kanton el sia gepatra, la makedona, kiun ni premiere publikigas.



Kostadinka Ŝimunić

ELENO, IDO, ELENO

*Eleno, ido, Eleno
Vi nura filino,
Kial vi pensas, pripensas,
leteron ornamas.*

*Mi skribas, panjo, mi skribas,
al urbo Edrene,
Edrene, panjo, Edrene,
al mia amato.*


*Li devus, panjo, li devus
aĉeti ĉapelon,
ĉapelon, panjo, ĉapelon,
belegan kaj altprezan.*

Esperantigis el la makedona: Kostadinka Ŝimunić

KIEL DIRI EN LA KROATA?

Baza kroata gramatiko kun frazaro, kiun aŭtoris Snježana Cimić estis eldonita de Universala Esperanto-Asocio. Ŝi celis aperi en la kongresa libroservo dum somero 2001 sed malfruis. Tamen, jen ĝi, havebla kontraŭ 1,80 eŭroj.






ĈU JESPER NEERGAARD DENOVE GASTOS EN KROATIO?

Kroata Esperanto-Ligo traktas kun *Muzej Mimara* pri eventuala gastado de trideko da skulptaĵoj de Jesper Neergaard en aŭtuno 2002. Jesper Neergaard donacis al la urbo sian skulptaĵon *Futuro*, kiu ornamas la zagreban Kennedy-placon. La urba oficejo pri kulturo subtenas la projekton, kaj kondiĉe ke subtenos ĝin Ministerio pri kulturo kaj Ministerio pri Eksterlandaj rilatoj de Danlando, ĝi povus okazi. Tiukaze krom en Mimara la ekspozicio gastus en urbo Osijek.

Pri Neergaard estis intertempe eldonita luksa monografio kun 450 fotoj. Inter ili troviĝas ankaŭ la zagreba *Futuro*. La libro estis lanĉita en Nacia Muzeo de Danlando en februaro.



MORTIS LELA

La 7an de marto 2002 mortis en sia 83a jaro **LELA ROTKVIĆ**, membro de Esperanto-Societo *Bude Borjan*. Laŭ profesio ĝardenarkitekto, inter la zagrebaj plej signifaj ĝardenarkitektoj, ŝi estis multe konata kiel edzino de la akademiano Ivo Rotkvić. Pri sia profesio ŝi kontribuis al *Tempo*. Apartan dankon ŝuldas al ŝi Esperanto-Societo *Bude Borjan*. Ŝi estas unu el 13 membroj de Bude Borjan kiuj enpaginte anticipas sian 10-jaran kotizon ebligis, ke en 1990 oni aĉetu garaĝon, kies ludonado faciligis la vivon de la societo dum la militaj jaroj.

NOVA TEATRAĴO DE STUDENTA ESPERANTO-KLUBO

Drama Grupo de Studenta Esperanto-Klubo partoprenis la printempan renkontiĝon de amatoraj teatraj ensamloj en Zagreb per la kroatversia teatraĵo de Vanja Radovanović **Instrukcioj pri simpla vivo harmonie kun la naturo**. La teatraĵo plaĉis al la faka ĵurio kaj la teatraĵo estis konsiderata inter la plej bonaj de la ĉi-jara rikolto. La Esperantan version de la teatraĵo Drama Grupo de SEK prezentos en Pupteatro Rijeka kadre de la kultura programo de la 5a kongreso de kroataj esperantistoj.

DAVID REY HUDEČEK PRI INTERNACIAJ KUTIMOJ

Knabo David Rey Hudeček (14j) preparis prelegon pri internaciaj kutimoj kaj pri la konduto translima por siaj klasanoj, utiligante interalie siajn Esperantajn spertojn. Per la prelego li gastis en Esperanto-Societo *Bude Borjan* kaj ankaŭ *Večernji list* intervjuis lin.

100-JARA ESPERANTO-ASOCIO EN HUNGARIO

Sabaton, la 2-an de marto, okazis en Budapeŝto la 32-a Hungaria Esperanto-Kongreso. Ĝi estis jubilea, pro centjariĝo de hungara landa Esperanta asocio. Mi ĉeestis, kiel reprezentanto de Kroatio. La programo komenciĝis per solena malfermo, kaj tiun sekvis prelegoj kaj diskutoj. Posttagmeze estis paralele programo de la 17-a Hungaria Pedagogia Tago, kaj Movada Forumo. En tiu lasta mi iom parolis pri KEL kaj pri la movado en Kroatio. Tio okazis en bela palaco de Instituto por blinduloj. Vespere, en iu restoracio en Peŝto, estis balo okaze de 10-a naskiĝtago de la gazeto "Eventoj". Por dimanĉa antaŭtagmezo estis planita florkronado de tombo de Gyula Baghy, kaj de la busto de Zamenhof.

Mi ofte komparadis en miaj pensoj la hungaran kongreson kun la kroataj. Impresis min granda labora parto, kun 6 prelegoj, kaj multaj aliaj homoj kiuj viciĝis por paroli antaŭ la publiko. Komence iom ŝajnis ke oni parolos nur hungare, sed feliĉe tio tamen ĉesis. Tiam mi rememoris ke ankaŭ en niaj kongresoj oni parte parolis kroate, kaj subite mi ekkomprenis kiel povis farti niaj eksterlandaj gastoj. Impresis min la fakto ke la kongreson gvidis ne nur unu persono, aŭ preskaŭ unu, kiel ofte ĉe ni, sed almenaŭ kvin tre ago-kapablaj personoj. Ankaŭ tagmanĝo por ĉiuj okazis, sen aldona pago, en la sama kongresejo.

Ni ĉiam pres(ig)as kongresan libron. Tio ne estis videbla en Budapeŝto. Do mi ne povas diri la nombron de partoprenantoj. Ofte mi eĉ ne povis scii kiuj ili estas, ĉar la insignoj havis nomojn ne facile legeblajn de malproksime. La malfermo komenciĝis per "La espero", sed surbendigita. Tiel mi komprenis ke fakte ne facila, kaj certe laŭdinda, estas nia kroata kutimo ke en ĉiu kongreso la himnon kantu iu bona "viva" kantisto. La hungaran himnon oni ne aŭdigis, kio estas plia argumento por tiuj kiuj ne scias kion aŭdigi kongrese. En la libroservo estis ĉefe hungaraj kaj instruaj, kaj ĉe ni Orbis Pictus regule ofertas ĉion, inkluzive beletron.

Hungaraj organizantoj invitis eksterlandajn gastojn el ĉiuj najbaraj landoj, sekve venis gastoj el Aŭstrio, Ĉeĥio, Kroatio, Pollando kaj Ukrainio. Salutovortoj venis ankaŭ el Slovenio. Ni, eksterlandaj gastoj, fartis bone kiel en paradizo. Ja ni ĉiuj havis pagitajn 2 noktojn en hotelo. Organizantoj aranĝis (kaj pagis!) vespermanĝon vendrede en iu restoracio, samkiel sabate dum la Evento-balo. Vendrede vespere ni ĝuis eĉ urborigardadon en Esperanto! Tre gastamaj estis hungaraj organizantoj, kaj ĉi tie mi denove dankas al ili.

Nun iom da interesajoj, aŭ eĉ kuriozaĵoj

Dum la Eventoj-balo oni disponigis ĉe ĉiuj tabloj manĝokartojn en Esperanto, kun supra parto de la teksto simila al la titolpaĝo de Eventoj. En la balo estis pluraj amuzaj programeroj, inter kiuj ankaŭ bonega "araba" ventrodancistino.

S-ro Árpád Rátkai prelegis pri ceteraj hungariaj Esperantaj societoj dum cent jaroj. Inter ili estas fenomeno nomiĝanta *Adriatika Ligo Esperantista* (1907-1908). Sed eĉ pli interesa estas hungaria organizaĵo nomita *Kroata Esperantista*

Societo (1909-1911). Do, nia KEL. Kvankam Zagreb apartenis al hungaria parto de Aŭstro-Hungario, tamen kroatoj ne nomis sian landon *Hungario*. Kaj mi opinias ke ne estas ĝentile ke hungaroj post cent jaroj fieru pri tiu Societo.

Impresis min atingajoj de hungara Esperanta movado. Ili ja havas internacie rekonatan gazeton "Eventoj", kiu estas gravega informilo pri tio kio okazos en Esperantujo. Ili havas Esperantodomon en Budapeŝto. Ili eldonis hungaran antologion, kiu estas multe pli granda ol similaj kroataj antologioj, kaj enhavas ne nur poezion, sed ankaŭ prozajn verkojn. Ili havas elstarajn personojn en sia movado, eĉ ambasadoron. Sed la plej interesa fakto estas ŝtataj ekzamenoj por studentoj en Esperanto. Pro iu nova leĝo, studentoj devas havi diplomon pri 2 fremdaj lingvoj. Tio estas certe granda ŝarĝo por multaj el ili, do multaj malkovris Esperanton, kaj ke ĝi estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj. Sekve, tiaj ekzamenoj jam okazas dum pluraj jaroj. Mi forgesis la nombron de ekzamenitoj, sed ŝajnas ke temas pri miloj!

Fine mi diru ion pri la urbo Budapeŝto. Kvankam ĝi estas relative proksima, ofte kroatoj scias malmulte pri ĝi. La urbo fariĝis per unuigo de la urboj Buda (okcidente de Danubo) kaj Peŝto (oriente) nur fine de la 19-a jarcento! Buda estas tre malnova, situanta sur nealta monto, kaj Peŝto (pli granda) en ebenaĵo. Inter ili fluas Danubo, kaj super ĝi staras 7-8 pontoj. Sub Danubo eĉ kondukas unu el 3 urbaj linioj de subtera fervojo. La urbo estas kovrita per densaj tram- kaj trajnlinioj, sed nur en ĝi mi vidis ankaŭ la veturilojn "trolebusojn". Homoj ofte supozas ke la urbo devas esti socialisme malriĉa kaj griza. Kia eraro! Eĉ en socialisma epoko ĝi surprize elstaris per grandeco, grandiozeco, kaj multaj enhavo. Nun ĝi eĉ pli brilas, kaj en ĝi oni povas trovi ĉion. Oni povus ĝin nomi Novjorko sur Danubo. Mi konsilas al vizitontoj unue veni al Buda, kaj de tie ĝui vastan rigardon al Danubo, Peŝto kaj pontoj. En Buda estas ankaŭ reĝa kastelo kaj fortikaĵo, multaj muzeoj, bela fabelaspekta "Fiŝista Bastiono" kaj preĝejo de Sankta Matiaso. Ial oni ankoraŭ ŝatas vidi sur apuda monto la fortikaĵon Citadela kun monumento de libereco (kvankam ruseca), kaj la statuon de kristana martiro Gellért. En Peŝto vidu la imponegan parlamenton, kaj la Placon de Herooj (kun statuoj de multaj gravuloj el hungara historio). Apud la Placo estas granda bela parko Városliget, kun fabelaspekta kastelo, kiu estas intence konstruita kiel miksaĵo el diverslokaj hungariaj konstruaĵoj. En Peŝto vi vidos larĝegajn stratojn kun amaso da malnovaj dom(eg)oj, kaj tio estos ne nur en 2-3 stratoj, sed grandega areo estas tia! Aĉetemuloj vizitu la butikcentron Westend City Center en la strato Váci. Ĝi estas "senfine" granda kaj plena je plej kvalita varo, kaj diverspecaj restoracioj. Ne miksu ties adreson (Váci ut) kun la tradicia strato kun malgrandaj vendejoj (Váci utca). Ne gravas ke vi ne parolas hungare, oni ofte parolas angle kaj germane, kaj mi konvinkiĝis ke homoj surstrate estas tre afablaj al eksterlandaj vizitantoj.

DAVOR KLOBUČAR

KLOPODOJ PRI RENASKIĜO DE ESPERANTO-MOVADO EN ISTRIO (inter virtualeco kaj realeco)

En specifa maniero, dum pluraj monatoj estas revalorigata Esperanto en Istrio. Konsiderante la aktualan situacion de esperantistoj tie (nemultnombrocon, izoliteco kaj, ofte, maljuneco) unue naskiĝis la virtuala esperantista komunumo. Pri ĝi, kiu estas pripensita kiel transnacia, neformala kaj senpaga virtuala klubo eblas legi en la retpaĝoj: www.esperanto-istra.hr-free-com kiujn ekkonstruas Marĉelo Trampuh el Kaŝtelir. Tra la paĝoj iu ajn intereso povas ankaŭ mendi senpagan virtualan bultenon de VEKII (Virtuala Esperanto-Klubo Istrio Internacie) kiun en Triesto redaktas KEL-membro Viŝnja Branković, la instiganto de la tuta projekto pri la plifortigo de Esperanto en Istrio.

Post multaj neformalaj kaj ĉiam internaciaj renkontiĝetoj de amikoj kaj najbaroj, en la domo de gastemaj Marĉelo kaj Kata Trampuh, en Kaŝtelir okazis simbola evento pri kiu skribis tri lokaj tagĵurnaloj, inter kiuj unu (la itallingva "La Voce del Popolo") tre amplekse. En la eventoj kernis kaj oficialis la vizito de Triesta Esperanto-Asocio kaj dum ĝi la partoprenantoj interalie plantis tri olivarbojn baptante ilin per la nomoj Trieste, Sidney kaj Hamburg. Temas pri la realigo de la propra ideo por kiu Marĉelo, profesia turisma ĉiĉerono, ricevis la premion en la konkurso de Turisma Komunumo de Istrio en la jaro 2000. La intenco estas ke la turisto en Istrio mem plantu sian propran olivarbon kaj plu interesiĝu kaj revizitu ĝin kaj Istrion. Laŭ la nomoj de du inter siaj loĝlokoj tra la mondo, la lastajn du arbojn baptis la internacia paro Milan kaj Elfride Sudec, kiuj elektis Istrion por ĝui sian pensiulan vivetapon. Post la aranĝo, la iniciatinto informis ankaŭ la esperantistojn en la respektivaj honorigitaj urboj.

Viŝnja Branković (Trieste/Osijek) kaj Danijela Poropat (Pula/Osijek) lastfebruare preparis en Barcelono spacon por eknaskiĝanta Barcelona Espe-

ranto-Kontaktejo (BEK). Temas pri malgrandaj ejoj super la brokantejo de Karles Berga i Molina kiuj estis uzitaj nur kiel deponejo. Nun tie estas preparitaj oficejo/kunvenejo, biblioteko kaj gastejo kun respektivaj kuirejo kaj banejo. Dum sia du-semajna kaj laborintensa restado Viŝnja kaj Danijela renkontiĝis kun la verkistoj Manuel de Seabra kaj Vimala Devi, kun esperantistoj ĉe UNESCO-klubo, junuloj ĉe kafejo "Badlands" kaj, okaze de ties jarkunveno, vizitis la sidejon de Kataluna Esperanto-Asocio en Sabadell. Plua kunlaboro, interalie pri la kursoj kaj seminario pri la Zagreba Metodo estas planata tra Orbis Pictus, la firmao de Viŝnja Branković. Al la ĉarma BEK plej bonvenas la gastoj kiuj dum sia restado en Barcelono pretas per iu programero kontribui al la vigligo de la loka Esperanta vivo.

Dum la 84-a Kongreso de Brita Esperanto-Asocio en Stoke-on-Trent (3-a ĝis 5-a de majo 2002) kiel oficiala kongresa invitito, Viŝnja Branković diversmaniere (tra prelegoj kaj kulturaj kaj gastronomiaj programeroj) prezentos kaj la famajn kaj la nekonatajn turismajn allogaĵojn de la magia kroata duoninsulo - Istrio. Kadre de la konresa temo "Esperanto hodiaŭ", krom kompleta prezentado de sia firmao kiu ofertas plurajn servojn al esperantistoj, la gastino el la istria najbarejo eluzos la okazon por ankaŭ tie paroli pri la specifaj manieroj revigligi Esperanton en Istrio. Ties ĉefa intenco estas ke la rilatoj inter Esperanto kaj Istrio kiel la plej evoluita kroata regiono (kaj la nura kroata partoprenanto de eŭropa projekto pri Eŭropaj Regionoj) estu praktikaj kaj utilaj por ambaŭ flankoj.

Pri ĉio supre prezentita eblas informiĝi pere de **Orbis Pictus de Viŝnja Branković, Via Parini 5, IT-34 129 Trieste, Tel/fakso +39 040 767 875, rete: orbispictus@iol.it**

IFEF EN PLOVDIV

La 14-an kaj 15-an de marto ĉ.j. en franca urbeto Port-Vendres, en la departamento Pyrénées Orientales okazis printempa estrarkunsido de IFEF (Internacia Fervojoj Esperanto-Federacio).

Marica Brletić, la prezidantino de KFEA ĉeestis la kunsidon kiel sekretario de tiu la plejmultnombra faka organizo de UEA. Ŝi transprenis la postenon dum lastjara IFEF-Kongreso en Tabor (Ĉeĥio). Dum trijara oficperiodo ŝi klopodos stiri IFEF-ŝipon kune kun la prezidanto R. Bolognesi (Italio), vicprezidanto I. Gulyas (Hungario), kasisto H. Hauge (Germanio) kaj redaktoro J. Ripoché (Francio).

La IFEF estraro pritraktis aktualajn problemojn, precipe preparojn por la 54-a IFEF-kongreso kiu okazos de la 1-a ĝis la 7-a de junio 2002 en Plovdiv (Bulgario). Estrarkunsido de IFEF okazis tuj post franca fervojsista E-kongreso kiun partoprenis preskaŭ 100 personoj. En ĉarma kataluna urbeto kun apenaŭ 5000 loĝantoj, tre proksime al Hispanio, la plej proksima franca urbero al Norda Afriko, esperantistoj ĝuis la freŝecon de proksimaj neĝkovritaj Orientaj Pireneoj kaj samtempe sentis varmecon, lumon kaj printempan etoson de mediteranea klimato.

Marica Brletić



Lucija Borčić preparas Esperanto-kroatan vortaron

Post kiam meze de la kongresa semajno en julio 2001 Lucija Borčić festis sian 80-jaran vivjubileon, la plej fekunda kroata Esperanto-tradukisto ne ĉesas surprizi nin per sia vivelano. Ŝi estas preparanta Esperanto-kroatan vortaron. La vortaron ŝi kompilas, tajpante per tradicia tajpilo. Ŝi atingis 600 paĝojn per la vorto *pirueto* kaj ŝi antaŭvidas pliajn 200 paĝoj! Por lingva kontrolo ŝi engaĝis multajn kunlaborantojn. Eldonisto de la vortaro estas serĉata.

Intertempe ankaŭ Islando bele honoris Lucija Borčić. La tiea revuo *La Tradukisto* omaĝis al Lucija per islandigo de ŝiaj originalaj Esperanto-poemoj. La Esperantan tradukon prizorgis Kristijan Eiriksson laŭ la perado de Zora Heide.

la
Tradukisto
124 MARTO 2002 1000-146 JARJ
40a
KVADRONATA REVUEO



Prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo akademiano Dalibor Brozović publikigis en "Filologija" eldonaĵo de Kroata Akademio de Artoj kaj Sciencoj, vol. 35/2002 artikolon "Slavaj elementoj en Esperanto". La sama artikolo en Esperanta traduko de Davor Klobučar estas preparata por La Monda Lingvoproblemo.

NOVA ANTOLOGIO EL LA KROATA LITERATURO PREPARATA

Ministerio pri kulturo aprobis subvencion de 10.000 kn por eldono de *Antologio de kroataj poetoj en Esperanto*. La elekton de la poemoj por la antologio jam faris D-ro Dunja Detoni Dujmić kaj tuta aro da tradukistoj eklaboris por prepari la libron: Lucija Borčić, Ivo Borovečki, Zora Heide, Nikola Rašić, Danijela Drakula, Goran Lakotić, Josip Pleadin, Zdravko Seleš, Mirjana Žeželj ...

Ne facilas traduki 78 poemoj de la dudeka jarcento. Granda laboro estas antaŭ ni.

Kroata Esperanto-Ligo esperas produkti la libron en 2003.

BIOGRAFIA LEKSIKONO DE KROATIAJ ESPERANTISTOJ FINPRETA

Post preskaŭ du-jara laboro, en kiu krom la kompilinto Josip Pleadin, partoprenis multaj kunlaborantoj tra Kroatio, "Biografia leksikono de kroataj esperantistoj" baldaŭ aperos en presita formo. Supozeble, la unuaj ĝin tenos en la manoj partoprenantoj de la aranĝoj en Rijeka. La libro estas 180-paĝa (formato 17,5 x 25 cm) kaj enhavas biografiajn notojn pri ĉirkaŭ mil personoj kun preskaŭ 500 fotoj, pluraj kun adresoj, telefonoj kaj retadresoj, kio donas al ĝi apartan valoron.

INVITO AL MEZLERNEJOJ EN MEZEŬROPO

Ni invitas la gejunulojn en Mezeŭropo en la aĝo de 13-17 jaroj partopreni en lerneja projekto en kiuj ili komparu sian scion pri Mezeŭropo en la kampo de literaturo, geografio kaj historio. La titolo de la projekto estas *Mezeŭropo estas mia hejmo*.

Ilia tasko estas akcepti la inviton al komuna feriado en Kroatio. Dato kaj loko interkonsentotaj. Ili kunportu siajn librojn el la koncernaj fakoj, kaj ili traktos kelkajn komunajn temojn pri Mezeŭropo kun siaj profesoroj. Interesiĝontoj ricevos detalojn pri la projekto.

Kroata Esperanto-Ligo pagas al ili la restadon. Ili devas mem kovri vojaĝkostojn.

La projekton finansas Ŝtata Instituto por protekto de familio, patrineco kaj junularo.

ESPERANTO KAJ MONTESSORI- LERNEJO

Judita Rey-Hudeček prelegis la 20an de aprilo 2002 por instruistoj edukigantaj pri Montessori-pedagogio. En la fokuso de ŝia prelego estis Esperanto kiel helpilo en edukado de invalidaj infanoj. Per Esperanto mense handikapitaj infanoj povas pli facile kapti la ideon pri lingvo kaj atingi sukceson en esprimado, grava por kuraĝigo de infanoj.

VIDA JERMAN EN BRAZILO

Zagreba aktorino Vida Jerman kiu regalis la kongresanojn de la zagreba UK per prezento de *La plej longa tago de Maria Theresia* en Kroata Nacia Teatro, estas kandidato por Premio de la urbo Zagrebo 2001 pro siaj meritoj pri la kultura programo de la Kongreso. Vida preparas nun recitprogramon de brazilaj aŭtoroj por la brazila UK.

KFEA GVIDIS AL CIKONIOJ

Kroata Fervojista Esperanto-Asocio organizis ekskurson al Ĉigoč, eŭropa vilaĝo de cikonioj, sabaton la 27an de aprilo. Malgraŭ granda pluvo, deko da esperantistoj pasigis agrablan tagon sur la spuroj de unu el niaj kongresaj ekskursoj. La venonta ekskurso de KFEA gvidas al Rijeka, al la 5a kongreso de kroataj esperantistoj. Ekiro vendredon la 31an de majo, gvidanto Roža Brletić Višnjčić.

ZAGREBA METODO EN LA POLA KAJ RUSA LINGVOJ

Zagreba eldonejo *Izvori*, posedata de esperantisto Damir Mikuličić, presis por Kroata Esperanto-Ligo novan eldonon de la zagreba lernolibro pri Esperanto de aŭtoroj Roger Imbert, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec kaj Zlatko Tišljar. La nuna, naŭa eldono estas presita en mil ekzempleroj.

Aldone al la lernilo KEL eldonis ankaŭ kompletigan instruilon *Esperanto ne estas nur lingvo* de Spomenka Štimec. Temas pri la nun kvara eldono de la lernilo kiu enkondukas komencanton en la Esperantan Movadon.

Pola eldonejo KLEKS en Bielsko Biala subskribis kontrakton kun la aŭtoroj pri la adapto de la lernilo *Zagreba Metodo* en la polan (mil ekzempleroj), dum eldonejo SEZONOJ en Kaliningrad en Rusio fintraktis pri la eldono de mil ekzempleroj de la zagreba lernolibro en la rusa.

La lernilo haveblas libroforme en la angla, franca, hungara, makedona, finna, malta, nederlanda, slovena, bulgara, portugala, kataluna, itala, germana kaj Esperanta eldonoj. Ĝi elĉerpiĝis en la korea, kirunda kaj japana lingvoj. Rete ĝi ekzistas en la dana.

La unuan eldonon de la libro lanĉis Zlatko Tišljar fine de la sepdekaj jaroj. La metodo konsistas el la baza lernolibro en 12 lecionoj, verkitaj per 500 plej oftaj radikoj de la parola Esperanto. Ĝin kompletigas kantoj de Johano Valono kaj bildstrio *Kiu estas Jozefo* de la sama aŭtoro kaj broŝuro *Esperanto ne estas nur lingvo*. Akompanas la metodon kasedo enhavanta la surbendigitajn lecionojn, kiun eldonis Kroata Loterio kaj kiu intertempe elĉerpiĝis. Elĉerpiĝis same daŭriga kurso por progresantoj, verkita de Spomenka Štimec. Zlatko Tišljar por la metodo verkis instrukciaron por kursgvidantoj.

KOMUNUMESTRO DE KOSTRENA AKCEPTIS ESPERANTISTOJN



Komunumestro de Kostrena Miroslav Uljan la 2an de majo 2002 akceptis delegacion de Esperanto-Societo Rijeka por informiĝi pri Alp-Adria Konferenco, Mezeŭropa Konsultiĝo kaj Konkurso pri Esperanto de lernejoj. En la interparolo kun Boris Di Costanzo kaj Vjekoslav Morankić Uljan anoncis eblan helpan al la estontaj laboroj de Esperanto-Domo en Kostrena kaj esprimis bedaŭron ke lernejoj en Kostrena ne havas Esperanto-kurson.



Vi kies manoj pli ĉastas

*Vi kies manoj pli ĉastas ol la miaj
kaj kiu saĝas kiel la senzorgo.
Vi kiu kapablas el lia frunt' legi
pli bone ol mi lian solecon,
kaj kiu forigas la lantaĵn ombrojn
de l' hezito el vizaĝo lia
kiel la printempa vento fortunigas
la nubombrojn drivantaĵ super la monteto.*

*Se ĉirkaŭprenu via kuraĝigas la koron
kaj koksoj viaj haltigas la doloron,
se via nomo ripozo estas
por liaj pensoj, kaj via kolo
ombro por lia kuŝejo,
kaj la nokt' de l' voĉo via fruktejo
ankoraŭ netuŝita de l' ŝtormoj,*

*Do restu daŭre apud li
kaj pli pia estu ol ĉiuj
kiuj lin amis antaŭ vi.
Timu la ĉojn alproksimiĝantaĵn
al la senkulpaĵ litoj de l' amo
kaj milde gardu lian dormon
sub la monto nevidebla
rande de l' maro muĝanta.*

*Promenu laŭ ĝia strando. Vin renkontu
la tristaj delfenoj.*

*Vagu tra l' arbaro ĝia. La lacertoj afablaĵ
ne malbonfaros al vi.*

*Kaj la serpentoj soifaĵ de mi dresitaĵ
estos humilaĵ antaŭ vi.*

*Por vi kantu la birdoj kiujn mi varmigis
dum la noktoj de l' fridaĵ frostoj.*

*Vin karesu la knabo kiun mi protektis
kontraŭ spionoĵ sur ŝoseo senhoma.*

*Por vi odoru la floroj kiujn mi aspergis
per larmoj miaj.*

*Mi ne ĝisatendis la plej belan tempon
de lia vireco. Lian fekundon
mi ne akceptis en mian sinon
kiun ŝiris la rigardoj
de l' brutarpelantoj sur foiroj
kaj de l' avidaĵ rabistoj.*

*Neniam mi permane guidos
liajn infanojn. Kaj la rakontojn
kiujn mi delonge preparis por ili
eble mi plorante rakontos
al povraj etaĵ ursetoj
kostlasitaĵ en nigra arbaro.*

*Vi kies manoj pli ĉastas ol la miaj
milde gardu lian dormon
kiu ja senkulpa restis.*

*Sed al mi permesu vidi
vizaĝon lian kiam sur lin
descendos la jaroj nekonataĵ.
Kaj forfoje ion pri li al mi diru
ke mi ne demandu fremdulojn
min primirataĵn kaj la najbarojn
kompatantaĵ mian paciencon.*

*Vi kies manoj pli ĉastas ol la miaj,
restu garde ĉe lia kuseno
kaj milde gardu lian dormon!*